

# *Bulgara* ESPERANTISTO





„Kolombo de la Paco“ celebras sian 5-jariĝon  
(vd. paĝon 6)



Partoprenintoj en la Printempaj Semajnaj E-Kursoj  
en V. Tarnovo (vd. paĝon 6)

#### Redakta Komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BORO-  
VANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro  
DENĜEV, Dimitro HAĜIEV, Maria JAN-  
KOVA, Krâstju KARUCIN, Hain LEVI,  
Venelin MITEV, Flori NIKOLOV.

Sekretario-administranto: **Metodi Garev**  
Korektinto: **Rajna Konstantinova**

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

## ENHAVO

|                                                                               |     |
|-------------------------------------------------------------------------------|-----|
| * * * Bulgario jam havas sian stelan<br>filon . . . . .                       | 1   |
| * * Komuniko pri la XII Konsultiĝo<br>de E-Organizaĵoj de Socialismaj Landoj  | 2   |
| * * Deklaro de la XII Konsultiĝo . .                                          | 2   |
| Ĉeestinto. Solidareco kun Vjetnamio . .                                       | 2   |
| Dimitro Denĉev. Patruja tero tra la<br>kosmo . . . . .                        | 3   |
| Radka Lazarova. Estu feliĉa! . . . . .                                        | 3   |
| Damjan Damjanov. La libero. Tradukis<br>Svetla Luĉanska . . . . .             | 3   |
| Ivan Draganov. El mia taglibro . . . .                                        | 3   |
| Ĉeestinto. „Kolombo de la Paco“ 5-jara                                        | 6   |
| Ĉeestinto. Amase faru tiel! . . . . .                                         | 6   |
| N. Aleksiev. Publika esperantista kun-<br>veno pri MEM . . . . .              | 6   |
| E. Ĉirpanski. Kun Esperanto ĉe la lim-<br>gardistoj . . . . .                 | 7   |
| Kursano. Printempaj E-kursoj en Târ-<br>novo . . . . .                        | 7   |
| Alelsandra Stefanova. Esperanto en<br>Svoĝe . . . . .                         | 7   |
| Milka Janeva. Solena celebros de la Vi-<br>rintago . . . . .                  | 8   |
| Kiril Ĉindin. Metodika renkontiĝo en<br>Kazanlâk . . . . .                    | 8   |
| D-ro St. Kadiev, R. Arnaudova. La Sofia<br>Literatura E-Rondo . . . . .       | 8   |
| Stefan Sokolov. La Sofia Literatura Ron-<br>do gastas . . . . .               | 9   |
| Cvjatko Todorov. Amika kontrakto . .                                          | 9   |
| * * * Kontrakto pri amikeco kaj kunla-<br>boro . . . . .                      | 9   |
| Evgeni Georgiev. La Pasporta Servo de<br>TEJO . . . . .                       | 11  |
| Canko Murgin. Pri la politika aspekto<br>de la unuaj bulgaraj e-istoj . . . . | 11  |
| A. Ĥarkovskij. Intervjuo kun prof. Paul<br>Ariste . . . . .                   | 12  |
| * * * Kia lingvo estas Esperanto? . .                                         | 14  |
| Dimitro Mutuŝev. Utila broŝuro . . .                                          | 15  |
| Fl. N. Pri la uzado de la pronomo „vi“                                        | 15  |
| Ilja Radev. Palaco de la amikeco kaj la<br>infaneco . . . . .                 | 15  |
| Nikolaj Fedotov. Novaj proverboj por<br>meditemaj cerboj . . . . .            | 16  |
| * * * Deziras korespondi . . . . .                                            | III |
| Ĝ. Rudari, P. Stupel. Vendisto de espero                                      | IV  |

#### Sur la kovrilpaĝo :

La internacia ekipo de la kosma ŝipo „Sojuz  
33“. Komandanto la flugisto-kosmonaŭto Ni-  
kolao Rukaviŝnikov (maldekstre) — dufoja  
heroo de Sovetunio, kaj la kosmonaŭto-esplo-  
ranto majoro Georgi Ivanov — civitano de  
PR Bulgario.

**BULGARIO JAM HAVAS SIAN STELAN FILON**

*La revo de la homaro penetri en la kosmon estis realigita per la flugo de la unua kosmonaŭto sur la tero — la sovetaj civitano Jurij Gagarin. Tio okazis la 12-an de aprilo 1961. Ekde tiam 45 sovetaj kosmonaŭtoj venkis la kosmon, sekvante entuziasme kaj sindone la ekzemplon de Gagarin.*

*Kaj jen: la 10-an de aprilo ĉi-jare, do dek ok jarojn post la unua flugo de homo tra la kosmo, forflugis ankaŭ nia, bulgara Gagarin — majoro Georgi Ivanov. Li forflugis per la kosma ŝipo „Sojuz 33“ kune kun sia komandanto — la dufoja heroo de Sovetunio Nikolao Rukaviŝnikov — flugisto-kosmonaŭto.*

*La heroaĵo de tiuj du kolumboj de nia epoko, libervolaj kaj sindonai agantoj de la scienco, ĉirkaŭflugis nian planedon. Nepriskribeblan ĝojon kaj fieron vekis la flugilhava bulgaro — inda nepo de la fabela majstro Manol. kiu iam ekflugis de Sultan Selim Moskeo en Ederne per propramane fapaaĵ ligna flugiloj. Apartan fieron vekis la fakto, ke la du kosmonaŭtoj ĉe ariatrte mal-facilaj kondiĉoj faris brile sian dutagan kosman flugon.*

*En la dektrijarcenta historio de Bulgario la tago 10 de aprilo, kiam el la kosmodromo Bajkonur estis elpafita la kosma ŝipo „Sojuz 33“, restos skribita per oraj literoj kiel tago unua de la kosma erao de socialisma Bulgario. Tio iĝis ebla nur dank' al la sincera, frata, senprofita amikeco inter la bulgara kaj sovetaj popoloj. Per la helpo, kiun donis al ni la patrolando de Ĉiolkovski, socialisma Bulgario fariĝis la sesa laŭvica kosma ŝtato — post USSR, Usono, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj GDR. Tiu ĉi helpo de USSR estas supera, plej nobla esprimo de la socialisma internaciismo en funkciado, esprimo de la eterna kaj nerompebla amikeco inter la du socialismaj landoj, inter la du frataj popoloj.*

*Sed la flugo de majoro Georgi Ivanov fariĝis ebla ankaŭ dank' al la grandegaj sukcesoj, kiujn atingis Bulgario en sia tridekkvinjara libera evolua. Nia lando, plej malriĉa kaj postrestinta en Eŭropo, priarbita kaj detruita de la faŝismo kaj kapitalismo, elektis antaŭ 35 jaroj sian evoluvojon — la socialismon. Ĝuste tiu ĉi vojo kondukis ĝin al certa ekonomia florado kaj rapida sciencetika progreso, transformis ĝin en potencon socialisman ŝtaton kun disvolvita industrio kaj moderna agrikulturo. Per sia heroa pasinteco kaj ĉiufanka nuntempa florado Bulgario inde okupis lokon inter la unuaj kosmaj ŝtatoj.*

*La flugo de bulgaro en la kosmo vekis meritan rekonon de elstaraj sciencistoj kaj sociagantoj en la tuta mondo. La ĝenerala sekretario de UNO Kurt Valdhajm en sia salutmesaĝo al la prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario Todor Ĵivkov notis, ke la flugo de bulgaro en la kosmo en la bulgara-soveta ekipo de „Sojuz 33“ markas novan paŝon en la internaciaj klopodoj pri paca esplorado kaj utiligo de la kosma spaco. Tiu evento, unuanime rekonita, parolas plej elokvente pri la granda forto de la internaciismo, trovinta esprimon en la programo de la landoj-membroj de la Konsilio pri Internacia Interhe'po „Interkosmos“.*

*La tuta bulgara popolo jubilas, ĉar ĝi jam havas sian stelan filon. Ni, la bulgaraj esperantistoj, ankaŭ jubilas, fieras kaj el tuta koro bondeziars: „Bonan vojon, patrujo kara, al novaj sukcesoj en la paca sturmo de la kosmo — por la bono de la homo, por la bono de la tuta homaro!“*

## KOMUNIKO

### *pri la XII Konsultiĝo de E-Organizaĵoj de Socialismaj Landoj*

De la 6a ĝis la 9a de aprilo 1979 en Viŝegrad (Hungario) okazis la XII Konsultiĝo de la E-Organizaĵoj de Socialismaj Landoj, kiun partoprenis reprezentantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando, Sovetunio, Vjetnamio kaj observanto el Jugoslavio, kiu ne partoprenis la voĉdonadon.

La partoprenantoj pridiskutis ĉefajn taskojn de la E-movado kaj interŝanĝis spertojn pri ties realigo en la kadro de la pliprofundiganta kunlaboro inter la E-organizaĵoj de la landoj. Dum la diskutado estis substrekitaj la aktiva partopreno de la E-movado en la tutmonda packonstruado.

La Konsultiĝo akceptis deklaron esprimantan apogon al la pacdefendo de Vjetnamio.

La partoprenintoj esprimas dankon pro la modela organizo de laborkondiĉoj kaj tre gastama prizorgo de la gastigantoj, t. e. la Hungara E-Asocio.

Viŝegrad, la 9an de aprilo 1979

LA XII KONSULTIĜO

## DEKLARO

*La XII Konsultiĝo de E-Organizaĵoj de Socialismaj Landoj esprimas sian fortan indignon pri la malica agreso de Ĉinio kontraŭ la pacama Socialisma Respubliko Vjetnamio, pri la barbaraj krimoj de la agresaj ĉinaj trupoj kontraŭ la civila vjetnama loĝantaro.*

*La Konsultiĝo esprimas sian solidarecon kun la multsuferinta vjetnama popolo — heroo batalanto por sia libero kaj sendependeco, kaj alvokas ĉiujn e-istojn aliĝi al la progresemaj fortoj en la mondo, agantaj subtene al la vjetnama popolo.*

*La agresanto for el Vjetnamio!*

*Vivu la paco en Sudorienta Azio kaj sur la tuta tero!*

### *La XII Konsultiĝo*

#### SOLIDARECO KUN VJETNAMIO

La delegitaroj por la XII Konsultiĝo de Reprezentantoj de la E-Organizaĵoj de Socialismaj Landoj partoprenis ankaŭ publikan kunvenon de la budapeŝta esperantistaro solidarece kun Vjetnamio.

La kunveno pasis en bona amika etoso, des pli ke ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de

Vjetnama Socialisma Respubliko, nome la prezidanto de la Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio k-do Ngugen Van Kin kaj la sekretario k-do Dang Dinh Dam.

La prezidanto de la Hungara MEM-Komitato k-do Molnar malfermis la kunvenon. Koncizan, sed sinceran kaj kortuŝan paroladon pri la neceso defendi la suverenecon de Vjetnamio kontraŭ la barbara ĉina agreso faris la konata hungara e-istino Eva Farkaš-Tatar. Alparolojn faris la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev, la sekretario de Centra Laborrondo Esperanto de GDR d-ro Detlev Blanke, la sekretario de Ĉeĥa E-Asocio Zdenek Krjmski, la vicprezidanto de la Asocio de Sovetaj E-istoj Vladimir Samodaj, la prezidanto de la MEM-Komisiono de Pola E-Asocio Leŝ Koŝenjak, la hungara pacamiko d-ro Oto Haspra. Kun aparta intereso oni aŭskultis la elpaŝon de k-do Dang Dinh Dam, kiu, anstataŭ fari parolan kontribuon, plenumis vjetnamajn popolkantojn en E-traduko. Per sia neforta, sed agrabla voĉo li kvazaŭ transportis nin en la mezon de la batalanta vjetnama popolo-heroo, kiu konservis sian altan spiriton eĉ dum plej teruraj tagoj de sia historio.

K-do Molnar dankis ĉiujn oratorojn kaj esprimis sian fidon en la fina venko de Vjetnamio kontraŭ ĉiuj kaj ĉiaspekaj agresantoj, promesante firman subtenon fare de la pacama esperantistaro de la mondo.

Ĉeestinto



Dimitro Denčev,  
flugisto-piloto

## PATRUJA TERO TRA LA KOSMO

*Al la bulgara kosmonaŭto Georgi  
Ivanov, portanta dum sia flugo  
tra la kosmo plenmanon da  
patruja tero*

Birdo bone ja komprenas birdon,  
tial pri flugiloj mi ne kantos.  
Pri la ter' bulgara mia liro  
kanton sunan laŭte nun ekkantas.

Povus vivi ni sen akvo, pano,  
povus vivi ni eĉ sen libero...  
Kontraŭ morton ĵetus ni sloganon,  
nur se starus firme ni sur tero.

Sed la homo — kiel do ekzistus  
eĉ momenton sen la tero ora?  
Al la steloj flugas la flugisto  
kun patruja tero sub la koro.

Tra la kosmo patrolanda tero! —  
Ruĝa pro la sango de l'popolo,  
kie ni naskiĝis, kaj espero  
kie lulas nin eĉ ĝis la tombo.

Tero, kiu naskas vivon, kantojn,  
kiu konas nian homan amon,  
ĝi al agloj faras nin konatoj,  
donacante al ni korojn flamajn.

En la vojo stela de Gagarin  
flirtas jam bulgara flago hela...  
Nun kun Georgi — kosmonaŭt' bulgara —  
Bulgario flugas al la steloj!

11-an de aprilo 1979

Radka Lazarova

## ESTU FELIĈA!

«Estu feliĉa!» — diris patrin'  
en infaneco mia.  
Ĉu mi estis aŭ ne,  
respondu, kara mia!

«Estu feliĉa!» — diris karul'  
en la juneco mia.  
Ĉu mi estis aŭ ne,  
respondon ne havas mi lian.

«Estu feliĉa!» — diras mi, —  
sorto, destino mia!  
Ĉu ĝi estis aŭ ne,  
mi diros ĉe morto mia.

«Estu feliĉa!» — diros mi  
al la infano mia.  
Ĉu ĝi estos aŭ ne,  
ĝi diros ĉe morto sia.

Damjan Damjanov

## LA LIBERO

La libero ne estas substantivo,  
kiel diras la filologoj.  
Ĝi ne estas signo ekkria,  
kiel pensas la demagogoj.

Ĝi estas stranga kaj saĝa frenezo!  
Ĝi estas la aero! La ĝermo de l'grajno!  
Ĝi estas ĉemizo kun truo kugla,  
tra kiu vidiĝas la suno.

*El la bulgara: Svetla Luĉanska*

Ivan Draganov  
Lige kun lia 80-jariĝo

## EL MIA TAGLIBRO

En la pasinteco mi estis kunlabo-  
ranto de iu revuo. Iun tagon hazarde  
sur la strato renkontis min la ĉefre-  
daktoro de tiu revuo kaj haltigante  
min diris:

— Kiam vi donos al mi la prome-  
sitan rakonton?

Mi estis mirigita. De kiam la re-  
daktoroj komencis peti pri rakontoj?  
Ĝis nun ne estis tiel. Trovi lokon en  
ĵurnalo aŭ revuo estis vera malfacila-  
jaĵo, kaj nun? Versajne la redaktoro  
ŝercas. Ja nun estas aprilo — la mo-  
nato de humuro, de senofendaj men-  
sogoj. Tamen la mieno de la redak-  
toro ŝajnis serioza, eĉ iomete severa —  
do nenia ŝerco... La redaktoro me-  
morigis, ke la rakonto estas necesa  
al li lige kun mia naskiĝo en monato  
aprilo. Agrable surprizita, mi donis  
promeson prezenti ĝustatempe la ra-  
konton. La redaktoro emfazis:

— Mi atendas de vi seriozan kaj  
aktualan rakonton — el la vivo mem.  
Ĉu vi komprenas?...

Dum la tuta tago mia penso estis  
okupata de la ideo pri la rakonto.  
Mi simple ne povis liberigi min de  
la insista tono de la redaktoro:

— Ĝi estu serioza! Ĝi estu aktuala!

Longe mi cerbumis en peniga em-  
baraso. Kaj subite venis la ideo, ke  
la necesan materialon eblas trovi en

mia taglibro. Do la taglibro estis malfermita. Mi dividis kun la leganto kelkajn momentojn, trovintajn lokon sur ĝiaj paĝoj.

Jam sur la unua paĝo estis io interesa, skribita de mi en la fora pasinteco: „La verk magiaĵoj de Jordan Jovkov“. Kaj en parentezoj: „El konversacio de Lamar kun la fama verkisto“. Jen la skribaĵo.

— Sinjoro Jovkov, — mi foje diris al Jordan Jovkov en kafejo „Panaĥ“, kie li en la momento estis restinta preskaŭ sola ĉe tablo en unu el la anguloj, — kie vi ĉerpas tiujn mirindajn magiaĵojn?

— Kiajn magiaĵojn? — Jovkov levis malrapide la kapon de sur sia ĵurnalo kaj ekrigardis min mirigite.

— Kompreneble, la verkistajn. . .

Mirinde estis ke li, kontraŭ sia kutimo, ĉi-foje ekparolis, dirante:

— Tie, kie ilin trovas ankaŭ vi, sinjoro Marinov: sur la tero, ĉe la homoj mem.

— — —

. . . jaro 1962. Surstrate renkontis min mia konato d-ro H. Li demandis:

— Ĉu vi havas iajn kontaktojn kun Svedio? Mi deziras havigi al mi de tie specialan medicinan aparaton. Jam mi skribis al kelkaj personoj en germana, angla kaj franca, tamen ĝis nun neniun respondis.

Mi diris al li, ke mi persone neniun konas tie, sed mi havas amikojn, kiuj korespondas kun homoj el ĉiuj kontinentoj. Tio tre mirigis la doktoron kaj li demandis:

— Kaj en kiu lingvo ili korespondas?

Mi klarigis al li, ke la lingvo, kiun tiuj amikoj uzas, estas Esperanto, ke ili estas esperantistoj, homoj tre komplezemaj. Mi promesis al la doktoro serĉi ilin.

Miaj amikoj havis adreson de konata sveda esperantisto kaj per letero petis lin helpi.

Post nelonga tempo la dezirata aparato estis alportita de la sveda esperantisto inĝeniero Gustav Nil-

son el Stokholmo, kiu venis por somerumi en „Zlatni Pjasaci“ ĉe la Nigra Maro.

Treege kontenta kaj danka, d-ro H. diris:

— Do, la homaro jam posedas komunan lingvon.

— Jes, delonge, kara doktoro, — mi respondis.

— — —

. . . jaro 1963. Per la ekspreso mi veturis al Orienta Germanio. Post la landlimo mi ĵetadis dekstren kaj maldekstren rigardon tra la fenestroj de la trajno. Sur la kamparo mi observis vilaĝanojn, tute similajn al la niaj — laboremaj, modestaj homoj. Kaj tuj okupis min la penso: pro kio militas la popoloj? Kiom malmulte da bonvolo estas necesa, por ke regu paco kaj amikeco sur nia tero! Nia planedo estas vastega. Sub la ĉielo — sufiĉa loko por ĉiuj. La naturo estas malavara. Sed mankas interkompreniĝo, kaj mankas io alia. .

Mi daŭrigis mian vojon. Jen estas la stacidomo de Beogrado. En la vagonon eniris viro kaj virino. Iel singene ili demandis, ĉu estas du liberaj lokoj en mia kupeo. Mi jesis kaj invitis ilin okupi la liberajn sidlokojn. Poste mi eksciis, ke la viro estas profesoro de muziko en urbo Skopie. Subite li diris:

— Ni estas feliĉaj homoj! Ni havas bonŝancon. . .

Mi demande ekrigardis lin, kaj li respondis:

— Ĉar ni tuj trovis liberajn sidlokojn.

Mi ĵetis rigardon al lia edzino. En ŝiaj okuloj perlis larmoj. Poste mi eksciis, ke ilia domo en Skopie estas tute ruinigita pro la terura tertremo, okazinta antaŭ nelonge. Ili savis sin tute hazarde.

Kaj la profesoro denove diris:

— Ni estas feliĉaj homoj, jes, feliĉaj homoj. . .

Mi alvenis en Orientan Berlinon. La unua vizito, kiun mi faris, estis ĉe mia leteramiko Valter Valdovski.



Mia filo, kiu loĝas en Berlino, akompanis min. Ni sonorigis ĉe la ekstera pordo. Aperis la edzino de Valdovski. Kompreninte, ke ni estas el Bulgario, ŝi ekkriis ĝoje:

— Valter, Valter! Venu tuj, du samideanoj el Bulgario!

Malgraŭ la ŝarĝo de siaj 75 jaroj, Valter laboris en sia ĝardeno. Li tuj venis, kaj ili ambaŭ invitis nin en la gastoĉambron. Okazis tre agrabla akcepto. Ni ne eksentis, kiel pasis preskaŭ du horoj en interesa amika konversacio. La dommastroj regalis nin per freŝaj fruktoj, ĵus plukitaj el la ĝardeno. Poste ni transiris en la kabineton de Valter. Granda biblioteko, plena je plej diversaj libroj, plejparte en Esperanto. En unu el la anguloj de la kabineto troviĝis belega skribotablo, sur kiu mi rimarkis la revuon „Nuntempa Bulgario“. Foliumante ĝin, mi vidis, ke tie estas presita mia priskribo de la 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio.

La sekvan dimanĉon mi vizitis la familion de d-ro Karl Majer. La akcepto estis same kortuŝa. Oni regalis nin per diversaj frandaĵoj. Antaŭ la adiaŭo d-ro Majer petis min skribi kelkajn liniojn en lia memorlibro. Mi volonte faris tion kaj finis mian skribaĵon per la vortoj:

„Por la esperantistoj la mondo ne estas tiom granda: ili ĉie kaj ĉiam trovas amikojn!“

— — —  
Vieno, 31. III. 1978. Post duonjara foresto de mia kara patrolando, mi fine forflugis al ĝi.

La aviadilo flugis je 10 000 m super la mara nivelo kun rapideco de 800—850 km hore. La vidaĵo estis belega, la panoramo — neordinare ĉarma. Oni ne povas priskribi la

Forpasis 71-jara

### **Atanas Gârgurov**

unu el la plej fervoraj disvastigantoj de E-o en Kjustendil kaj ĝia distrikto, aktiva partopreninto en la kontraŭfaŝisma batalo.  
Niajn kondolencojn!

admiron kaj la ĝuon, rigardante la grandiozajn Alpojn.

En iu momento ĉe mi ekstaris la stevardino. Proponante ĵurnalojn, ŝi afable demandis:

— Ĉu en germana lingvo, sinjoro?

Mi kapneis, kaj ŝi denove demandis:

— Ĉu en angla?

Mi denove kapneis kaj tuj gaje diris:

— Nur ion en Esperanto, mi petas!

— En Esperanto? Bone, mi tuj alportos al vi „Heroldon de Esperanto“.

Mi estis agrable surprizita. La stevardino montriĝis esperantistino. Post minuto ŝi vere alportis la konatan ĵurnalon. Sed ne restis tempo legi, ĉar ni komencis konversacion en Esperanto, pli ĝustadire, ŝi parolis, kaj mi nur aŭskultis, ĉar ŝia parolmaniero estis tiel agrabla, ŝia parolado tiel belsona, kvazaŭ kanto, ke mi ne povis satĝui ĝin.

Sed jen la stevardino eksilentis, ĵetis rigardon al sia brakhorloĝo kaj maltrankvile diris:

— Vi jam devas pretigi vin, sinjoro, ĉar post dek minutoj ni alvenos Sofion.

Ĉe la adiaŭo ni interŝanĝis niajn adresojn.

— Ĝis revido, mia nova Esperanto-konatinino Rene Sulc!

— Ĝis nova, baldaŭa renkontiĝo, sinjoro Draganov!



# ORGANIZA VIVO

## „KOLOMBO DE LA PACO“ 5-JARA

La 31an de marto en u. Gâlâbovo, distrikto Stara Zagora, okazis solena celebrego lige kun la 5-jariĝo de la loka E-societo «Kolombo de la Paco». En la Domo de la Kulturo «Energetik» kolektiĝis e-istoj el la urbo kaj gastoj el Sofio, Burgas, St. Zagora, Jambol, Ĉirpan, Dimitrovgrad, Pazarĝik, Drjanovo ka. Raporton pri la ĝisnuna agado faris Kanju Kanev — prezidanto de la societo. Reprezentantoj de diversaj E-societoj adresis amikajn salutojn. En la nomo de la CE de BEA salutis gâlâbovanojn k-do Kunĉo Vâlev, sekretario de CE. Li dekoris la brustojn de multaj E-aktivuloj per arĝentaj kaj bronzaj jubileaj insignoj de BEA.

Sekvis riĉa belarta programo.

Vespere — granda printempa esperantista balo, amika kunesto kaj amuzado.

Lige kun la jubileo de «Kolombo de la Paco» estis aranĝita bildekspozicio de s-ano Prodan Prodanov el Sofio sub titolo «De Moskvo ĝis Madrido», kiun la urbanoj kaj la e-istoj kun intereso rigardis.

E-societo «Kolombo de la Paco», malgraŭ nur 5-jara ekzistado, havas riĉan kaj varian agadon, bonegajn sukcesojn. Ĝia membraro jam superis 80, la abonantoj de «BE» — same. «Kolombo de la Paco» estas modelo por ĉiuj E-societoj en la lando.

Ĉeestinto

## AMASE FARU TIEL!

Lige kun la Internacia Jaro de la Infano E-societo «Kolombo de la Paco» en u. Gâlâbovo organizis komunan renkontiĝon de ĉirkaŭ 70 infanoj (e-istoj kaj nee-istoj), ties gepatroj kaj lokaj e-istoj — ĉ. 100 personoj.

Oni kondukis la infanojn ekster la urbon, en arbaron, apud la ripozdomojn de la loka Briketa Fabriko kaj la Poŝtistoj. Seĝoj ekstere, sur kiuj sidas la gepatroj. Flagetoj verdaj flirtas sur la arboj kaj en la manoj de 15 infanoj en la unua vico. Malgrandaj artistoj prezentas recitalon «Infaneco mia». Estrarano de la E-societo salutas la infanojn, dekoras ĉies bruston per verda stelo. Fotado.

Tagmeze komuna tagmanĝo. E-isto rakontas la historion de tiu ĉi regiono, parolas pri la laboro de la e-istoj, kiuj konigas ĝin tra la mondo, rakontas pri la lingvo E-o.

Poste — ludoj de la infanaro je freŝa aero, kantado, amika kunesto. Nur antaŭ vesperiĝo ĉiuj revenis hejmen.

Kaj infanoj, kaj gepatroj, kaj plenaĝaj e-istoj — ĉiuj estis ege kontentaj de la renkontiĝo kaj ĉiam memoros ĝin kun danko al la estraro de «Kolombo de la Paco».

Ĉeestinto

## PUBLIKA ESPERANTISTA KUNVENO PRI MEM

En aprilo okazis tuturba kunveno pri la Mondpaca Esperantista Movado (MEM), organizita de la DE de BEA en Sofio. Prelegon pri MEM faris en bona kaj flua E-stilo la membro de la Internacia Komitato de MEM kaj alta funkciulo de la Ministerio de Eksteraj Aferoj k-do Dimitro Haĝiev (iom poste elektita ankaŭ kiel prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato).

En sia prelego k-do Haĝiev faris profundan analizon de la estiĝo, evoluo kaj nuna stato de la Mondpaca Esperantista Movado. Li omaĝis ĝiajn vivajn kaj forpasintajn aktivulojn, substrekante la grandan signifon de ilia klarvideco kaj energio prepari kaj fondi dum la periodo de la «malvarma milito» bone orientitan pacmovadon de la esperantistaro. Pinto de la sukcesa agado de MEM li konsideras la intiman kunlaboradon de MEM kun la Monda Packonsilio, fiksitan en speciala interkonsento. Montante per konkretaj ekzemploj la aktivan partoprenon de MEM en vico da internaciaj aranĝoj defende al la monda paco, k-do Haĝiev skizis ankaŭ la ĉefajn taskojn starantajn antaŭ MEM por la sekva periodo, en la spirito de la rezolucio de la Oka Ĝenerala MEM-Konferenco en Varno (1978).

La parolado estis atente aŭskultata de la ĉeestantoj kaj aprobita per longaj aplaŭdoj. Evidente, la streĉa internacia situacio, kiam la imperiistaj fortoj faras ĉion eblan por neniigi la komenciĝintan malstreĉecon en la internaciaj rilatoj, grand-skale urĝigi la vetarmadon kaj provoki novan atomarmilan militon, plialtigas la intereson al la agado de la pacama esperantistaro sub la standardo de MEM. MEM montras la plej efektivan vojon al ruinigo de la planoj de la imperiistoj, apelaciante al la esperantistaro kunigi siajn fortojn kun la fortoj de centoj da internaciaj kaj miloj da landaj pacmovadoj kaj organizaĵoj, formante gigantan mondan publikan opinion, kapablan frakasi la propagandistojn kaj organizantojn de nova monda milito. Restas aktualaj la famaj vortoj de la fama franca sciencisto Joliot Curie (Jolio Kjuri): «La batalo por la paco estas devo de ĉiuj kaj de ĉiu!»

Ni, esperantistoj, montru praktike, ke ni bone komprenas nian pacaman devon, defendante tiamaniere plej efike ankaŭ la karan al ĉiu sincera e-isto esperantistan movadon.

N. Aleksiev



Post nia partopreno en la Ia mezlernejana konferenco kaj festivalo de la artparolo en Jambol ni havis riĉan programon kun patriotisma enhavo. Ĝin ni proponis al la Patrolanda Fronto kaj jam prezentis ĝin en diversaj loĝlokoj ĉirkaŭ Dospat.

Neforgeseblaj estis la vizitoj ĉe la limgardistoj. La soldatoj renkontis nin ege varme kaj kore.

Antaŭ la programo estis klarigaj vortoj pri E-o kaj nia E-soceto. Ĉiuj oficiroj kaj soldatoj aŭskultis atente pri la 63a UK de E-o en Varno, pri la 34a TEJO-kongreso, pri la Internacia E-kursejo en Smoljan, pri la sukcesoj de la bulgaraj e-istoj. La tuta programo estis en E-o. La plenumo de rodopaj kantoj en E-o fare de Fedja Trampov agrable kortuŝis ĉiujn. La oficiala programo finiĝis, sed la ĉeestantoj aplaudis kaj postulis ankoraŭ.

Poste oni dankis kaj petis lernolibrojn kaj gazetojn, promesante lerni obstine E-on. Sekvis dancoj kaj amuzoj. La foriro estis ebla nur post nia promeso denove reveni kaj gastigi ĉe la limgardistoj.

E. Ĉirpanski

## PRINTEMPAJ E-KURSOJ EN TÂRNOVO

La Printempaj Semajnkursoj, organizataj regule de la Instruista Sekcio kaj la Sofia DE de BEA, okazis ĉi-foje en Veliko Târnovo. Partoprenis ĉ. 30 personoj. Grupgvidantoj: Neno Janev (I grado), Violin Oljanov (II grado), Kunĉo Vălev (III grado). En la III grado lernis 14 s-anoj. Ekzamenon faris 8 kursanoj (2+2+4 por la tri gradoj), ĉiuj sukcese.

Krom la trarigardo de la urbo, plena je historiaj kaj kulturaj monumentoj (Carevec, la domo de Kolju Fiĉeto, la gastejo de Haĝi Nikoli, la historia muzeo ka.) okazis ankaŭ ekskurso al vilaĝo Arbanasi, interesa pro la konservita arktitekturo de malnovaj privataj domoj kaj preĝejoj.

Enkadre de la Semajnaj Kursoj estis organizita renkontiĝo de la kursanoj kun la lokaj e-istoj. Ĝi okazis en la salono de la Centra Poŝtejo. Pri aktualaj taskoj de la E-movado parolis k-do K. Vălev. Sekvis belarta programo fare de kursanoj kaj lokaj e-istoj. Estis ankaŭ dancoj, amuziĝo.

Kiel kutime, en la kursoj oni lernis tre serioze kaj bonrezulte. Ankaŭ kreiĝis novaj amikecoj kaj kontaktoj inter gesamideanoj el diversaj regionoj de la lando. Tial ĉiuj partoprenintoj estis tre kontentaj. Ni dankas al la s-anoj el V. Târnovo, kiuj kontribuis por la bona organizo de la kursoj (loĝigo, nutrado, ekskursoj ka), aparte al gek-doj Hr. Dolĉinkov, N. Najdenov, M. Pejкова, Ml. Deneva, T. Dimitrov ka.

Kursano

Tio okazis antaŭ deko da jaroj en la balkanmontara urbeto Svoĝe. Jordan Atanasov, instruisto, ofte vizitis la bibliotekon. Lia ŝatata temo estis E-o. Li parolis arde, konvinke pri tiu lingvo, pri la utilo, kiun ĝi donas al la homoj. Vekiĝis intereso. Tiam Atanasov proponis organizi kurson de E-o. La biblioteko helpis pri diskonigo de la kurso. Junaj homoj komencis lerni la lingvon. La 5an de januaro 1971 estis fondita ankaŭ E-societo, kiu ricevis la belan nomon «Amikeco». Plej bona helpanto de Atanasov fariĝis Elena Radenkova, bibliotekistino.

La jaroj forpasadis, la verda anaro iom post iom kreskis. Jordan Atanasov ne plu laboras en Svoĝe, sed li lasis indan antaŭanton en la personeco de Radenkova. Bone helpis la E-agadon ankaŭ d-ro Kânĉev el la loka hospitalo. Dum la lastaj jaroj la plejmulto de la membroj estas gejunuloj. Nun la societo havas 28 membrojn. Funkcias tri E-kursoj—en la gimnazio «Diĉo Petrov», en la Mekanika Mezlernejo kaj civitana. Ĉiujn gvidas Elena Radenkova, kiu diplomigis la pasintan jaron en Sofio. La kursoj funkcias regule. Laŭ la kontrakto, subskribita inter la Komitato de Kulturo kaj BEA, la estraro de la legejo (biblioteko) devas helpi la E-societon, do ĝi devas antaŭvidi en sia plano ankaŭ taskojn pri kuna laboro kun la e-istoj. En la plano de «Amikeco» oni antaŭvidas vitrinojn, agittabulojn, radiodisaŭdigojn, renkontiĝojn kun e-istoj el Sofio, ekskursojn al montodomo «Esperanto» sur Vitoŝa, prelegojn pri E-temoj ktp. Ĉiuj societanoj havas membrokartojn, portas E-insignojn. La societo ricevas la E-gazetojn «Bulgara Esperantisto», «Paco», «Scienca Mondo».

Laŭ Aleksandra Stefanova

(el ĵ. «Sofijska Pravda» — 10. IV. 1979)

E. Radenkova (en la unua vico, dekstre) kun siaj kursaninoj



## ***Solena celebrazo de la Virintago***

Ci-jare E-societo «Verda Torĉo» en Gabrovo solene celebris la Internacian Tagon de la Virino — la 8an de marto. En bele ornamita salono de la Kulturdomo estis aranĝita interesa ekspozicio de diversnaciaj pupoj el la riĉa pupkolekto de Elena Kovaĉeva.

Post salutparolado de Djanko Minĉev lernantoj el la kurso de E-instruistino Sonja Tihova plenumis belan programon el E-kantoj kaj recitaĵoj. La ĉeestantoj aprobis tekston de protesta telegramo kontraŭ la ĉina agreso en Vjetnamio. La virinoj regalis ĉiujn gastojn per hejme preparitaj dolĉaĵoj.

La celebrazo finiĝis per komunaj kantoj kaj dancoj.

Milka Janeva

## ***Radio-intervjuo***

Lige kun la 75-jara jubileo de E-societo «Albatroso» en Varna la 1an de aprilo Radio Varna disaŭdigis intervjuon kun doc. Georgi Dimov, prezidanto de DE de BEA.

## **METODIKA RENKONTIĜO EN KAZANLÂK**

Laŭ decido de la Distrikta Estraro de BEA en Stara Zagora je la 15 de aprilo en Kazanlâk okazis renkontiĝo de E-instruistoj kaj kursgvidantoj el la distrikto. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la DE Rajno Ĉipilev.

Modelan lecionon faris k-dino Penka Miĥajlova el Kazanlâk — diplomita E-instruistino. La leciono estis bonega. La lernantoj partoprenis tre aktive.

Dum la diskutado la parolon havis R. Ĉipilev, N. Kisjov, J. Koruĝiev, Iv. Legov, Sv. Damjanova, P. Nestorov. Ĉiuj esprimis sian admiron pri la laboro de P. Miĥajlova kaj rekomendis, ke ŝi faru similan lecionon ankaŭ aliloke.

Kiril Ĉindin

*La kursanoj de Penka Miĥajlova plenumas artprogramon*



## **LA SOFIA LITERATURA E-RONDO**

Ĝi estas fondita en 1963 j. kiel studenta E-rondo pri literaturo. Ĉiajn kunvenojn tiutempe vizitadis la gestudentoj Venelin Mitev, Nikolaj Uzunov, Delka Ĉolakova ka. Gvidanto — Asen Grigorov.

Kun la pasado de la tempo la studenta literatura rondo transformiĝis en tuturban. Hodiaŭ ne malmultaj verkemaj e-istoj el Sofio ĉiam kun senpacienca atendas la unuan tagon de la semajno por viziti la kunvenon de la Rondo, havanta jam sian specifan etoson kaj tradiciojn.

Ĉiaj analoj entenas nomojn de e-istoj, kies verka talento kaj lingvoposedo maturiĝis en ĝi. La teknologio de laborado estas simpla: oni multbobligas en kelkdekoj da ekzempleroj la verkojn diskutotajn kaj disdonas ilin por trastudo. Ĉiu laŭ sia literatura kaj lingva nivelo aprobas aŭ malaprobas, kritikas, korektas, montras pozitivajn kaj negativajn flankojn, tiel ke la aŭtoro komprenas, kiel oni akceptos lian verkon, se ĝi atingus la vastan legantaron. Asen Grigorov dum la tuta multjara periodo ĝis antaŭ unu jaro, kaj nun Ljubomir Miĥajlov, la nova gvidanto, kiel lastaj diras siajn aprezojn. La aŭtoro de la verko ĉe la fino rajtas konsenti aŭ ne konsenti pri la faritaj rimarkoj. Tiu momento estas plena de interesaj literaturaj starpunktoj, kaj ofte la diskutado daŭras ankaŭ post la difinita unuhora kunestado.

Pluraj verkoj de la rondanoj trovas lokon en gazeto «Bulgara Esperantisto», precipe en ĝia duobla numero 7—8. Verkoj de rondanoj aperas ankaŭ en «Paco» kaj aliaj gazetoj. Ne-foje plej altaj literaturaj konkursoj estas gajnataj de rondanoj (N. Nedelĉeva, R. Konstantinova, L. Bojaĝieva, M. Ŝekerĝiev ka.).

La etika temaro en la rakontoj de Nevena Nedelĉeva, la folkloraj priskriboj de Prodan Prodanov, la temoj el la patrolanda historio de Stefan Sokolov, Miĥail Ĉobanov, Vesela Ivanova, Nadja Ĵejnova ka. — ĉio ĉi bone parolas pri la varieco de la rondanaj verkoj.

La temoj de la E-poetoj prezentas same grandan diapazonon. La rondanoj priantas la amon al la patrujo (L. Bojaĝieva), tenerajn korsentojn (P. Batoeva), proteston kontraŭ milito (Kr. Aleksova, St. Kostadinov, St. Kadijev) ka. En tiu kampo aparte aktive partoprenas Asen Grigorov. Ljubomir Miĥajlov kontribuas per tradukoj de fabloj de Krilov el la rusa lingvo kaj de «Limerikoj» — el la angla.

Kiel vivanta organismo la Literatura Rondo ege suferas pro la forpaso de sia karmemora originala fablisto Simeon Ĉirpanliev.

Iuj el la membroj, kies talento fortikiĝis, elflugis jam kiel birdoj al la vasta literatura



mondo. Sed la nombro de la rondanoj restas ĉiam pli-malpli la sama, ĉar ĉiam venas novaj verkemuloj.

Tipa ekzemplo estas Rajna Konstantinova. Ne povante pro nebona sanstato regule ĉeesti la kunvenojn de la Rondo, ŝi tamen ĉiam intime sekvas ĝian evoluon. Konstantinova akiris gravajn sukcesojn kiel aŭtorino de originalaj rakontoj kaj gajnis premiojn en kelkaj literaturaj konkursoj. Intereson por la rondanoj prezentas ankaŭ la rakontoj de Miŝo Zdravev, kiu, konata kiel estrada kantisto, nun aperas ankaŭ kiel verkisto. Zdravev havas meritojn same kiel organizanto kaj plenumanto ĉe gastadoj de la Rondo sur la scenejo de E-societo «M. Gorkij» kaj aliloke.

Komence la fondinto Asen Grigorov plenumis ankaŭ la sekretariadon kaj la teknikajn laborojn, sed poste tion akceptis sinsekve Rajna Arnaudova, d-ro Stefan Kadiev, Stefan Sokolov.

La informo pri la Sofia E-Rondo en Sofio tamen ne estus plena, se oni ne menciis la nomon de ĝia talenta interpretistino Vera Vâjarova, kiu senlace parkeras verkojn — prozajn kaj poeziajn — de membroj de la Rondo. Dank' al ŝi la publiko en Samokov, Kazanlâk, Pernik, Kjustendil, Asenovgrad, Blagoevgrad, Plovdiv, Pazarĝik aŭdis verkojn de la rondanoj.

Ekde kelkaj jaroj en la Rondo aperis nova, ne malpli grava aktiveco — la tradukado. Dum tiuj okupoj la atmosfero aparte bolas. Kiom multe da subtilaĵoj pri gramatiko, bona stilo, belsoneco, ritmo, pri evito de bulgarismoj! Konsultantoj: Asen Grigorov, prof. Stojan Guĝev, Simeon Simeonov, Flori Nikolov, Ljubomir Miĥajlov, la nestoro de la E-movado — Atanas D. Atanasov — Ada, s-anino Mirdza Burgmeister el Riga (USSR) ka.

Agrablan variigon alportis al la rondanoj la sporada gastado de alilandaj samideanoj el Turkio, Britlando, Jugoslavio ka.

Nerompebla leĝo en la Rondo estas: paroli nur en Esperanto! Dank' al tio iufoje ĝiaj kunvenoj aspektas kiel konversacioj,

tre gravaj el vidpunkto de praktikado de la lingvo. Jes, kara leganto, ne miru: al la Rondo venas ankaŭ komencantaj e-istoj. Sufiĉas, ke en ilia koro flagras la fajrero de kreanto. Post kelka tempo ili plene ekregas la lingvon.

Unu el la taskoj de la Sofia Literatura E-Rondo estas helpi la fondon de literaturaj E-forĝejoj ankaŭ en aliaj lokoj.

D-ro Stefan Kadiev,  
Rajna Arnaudova

## LA SOFIA LITERATURA RONDO GASTAS

Je la 4a de aprilo membroj de la Literatura E-Rondo en Sofio gastis al la societanoj de la tuturba E-societo «M. Gorkij».

En mallonga parolado Asen Grigorov, multjara gvidanto de la Literatura Rondo, raportis pri la agado de ĝiaj membroj, kies verkoj kaj tradukoj regule aperas sur la paĝoj de «Bulgara Esperantisto» kaj aliaj E-gazetoj.

Sekvis recitadoj de la rondanoj. Vesela Ivanova legis sian fabeleton. Vera Vâjarova, operkantistino, recitis versaĵojn de Anna Mindova, Asen Grigorov, Kristina Aleksova, Ljuba Bojaĝieva. Rajna Arnaudova recitis versaĵon de Asen Grigorov dediĉe al la centjariĝo de Sofio kiel ĉefurbo de Bulgario. Simeon Simeonov legis sian kortuŝan versaĵon, dediĉitan al la Literatura Rondo. Jorĵeta Zdraveva recitis «Limerikojn» — ŝercajn verskvinojn, tradukitajn el angla lingvo de la nuna gvidanto de la Rondo Ljubomir Miĥajlov. Miĥail Ĉobanov legis sian rakonteton por infanoj. Miŝo Zdravev legis siajn lirikajn versaĵojn. Tiu lasta kun sia filino Jorĵeta Zdraveva prezentis akton el la komedio de Nevena Nedelĉeva «Ankaŭ tio okazas».

Reĝisoro de la Literatura Vespero estis la artisto M. Zdravev. En la paŭzo lernanto el la Muzika Konservatorio violonis sonaton de Bach. La publiko aplaŭdis la interpretantojn kaj la aŭtorojn.

Stefan Sokolov

## AMIKA KONTRAKTO

Multjara amikeco ligas la membrojn de E-societo «Vekiĝo» (urbo Ŝumen, Bulgario) kaj E-societo «Progreso» (Magdeburg, GDR). Okaze de ĉiu nacia kaj internacia festo oni interŝanĝas salutleterojn, fotojn, infandeseĝnaĵojn k. a. Estis aranĝitaj ekspozicioj. La individua korespondado, reciprokaj gastadoj kaj interŝanĝo de delegitaroj kontribuas por la proksimiĝo de la ordinaraj ho-

moj, por disvastigo de E-o kaj interŝanĝo de spertoj.

Nova manifestiĝo de la fortaj amikaj ligoj inter la e-istoj de ambaŭ urboj estis la gastado de delegitaro de «Vekiĝo» en Magdeburg fine de septembro 1978 laŭ invito de la urba estraro de Kulturligo de GDR kaj la estraro de E-societo «Progreso». La germanaj amikoj montriĝis tre gastamaj dom-

mastroj. Ili konigis al ni la historiajn kaj aliajn rimarkindaĵojn de sia renovigita urbo, aranĝis ekskurson al la pitoreska urbeto Vernigerode. Plej valoraj estis la renkontiĝoj kun la distrikta kaj urba estraroj de la Kulturligo, en kiu kolektive membras la germanaj e-istoj, kaj la okazintaj tie intertraktadoj por plua intensigo de la ligoj. Aparte memorinda restas la renkontiĝo de

la distrikta estraro, kiam d-ro Detlev Blanke inspire rakontis pri la 63a UK en Varno. Oni projekciis kolorfilmon pri Sumen kaj la antaŭstaranta 1300a jubileo de Bulgario. Estis subskribita la unua kontrakto pri Amikeco lige kun la 30a datreveno de la fondiĝo de GDR kaj la 35 datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario.

Cvjatko Todorov

## KONTRAKTO PRI AMIKECO KAJ KUNLABORO

inter E-societo „Vekiĝo“ (u. Ŝumen, Bulgario) kaj E-grupo „Progreso“ (u. Magdeburg, GDR)  
el la interfratigitaj distriktoj Ŝumen kaj Magdeburg

La e-istoj de ambaŭ distriktoj eliras ĉe tiu ĉi kontrakto el la jeno:

— ke la bazo por pliprofundigo kaj disvastigo de la amika kunlaboro inter la e-istoj en niaj distriktoj Sumen kaj Magdeburg estas la interkonsentoj pri amikeco, kunlaboro kaj reciproka helpo, kontraktitaj inter niaj du ŝtatoj,

— ke nia agado sur la kampo de E-o devas subteni ĉiujn progresemajn fortojn en la mondo cele al la paco kaj interpopola amikeco,

— ke necesas profundigi la amikajn rilatojn kaj akceli la disvastigon de la internacia lingvo E-o inter la civitanoj de niaj urboj kaj distriktoj.

En tiu senco ni kontraktas pri la jeno:

1. La du estraroj regule interŝanĝas informojn pri ambaŭflanke interesaj demandoj kaj akordigas komunajn projektojn. Unuavice tio koncernas:

— informojn pri socipolitikaj kaj aliaj gravaj eventoj en la propraj ŝtatoj, distriktoj kaj urboj,

— raportojn en la gazetaro de la propra distrikto aŭ urbo pri la fratigita distrikto aŭ urbo,

— laborrezultojn kaj planojn de la e-istoj de la propra ŝtato, distrikto aŭ urbo,

— raportojn en la gazetaro pri la loka E-movado.

2. La estraroj akcelas personajn leteramikecojn kaj reciproke gastadon inter la

membroj, propagandas E-on inter la civitanoj kaj varbas novajn adeptojn.

3. La estraroj reciproke konatigas la membrojn kun la historio, nuna vivo kaj progresado de ambaŭ urboj kaj distriktoj, kun la agado de la aliaj socipolitikaj organizaĵoj, aranĝas ĉiujare solenaĵojn okaze de la naciaj festotagoj kaj interŝanĝas salutmesaĝojn okaze de politikaj kaj kulturaj festotagoj. Ambaŭ estraroj realigas ekspoziciojn pri la fratigita urbo resp. distrikto kaj pri la amikeca kunlaboro (en fabrikoj, institucioj, lernejoj ktp.).

4. Inter ambaŭ estraroj regule ĉiun duan jaron okazu interŝanĝo de delegacioj cele al konkretigo de la amikeckontrakto kaj al interkonsiliĝo pri komunaj planoj. Kaŭzo de la delegaciinterŝanĝo devus esti amikecaj renkontiĝoj en la E-grupoj kaj la interŝanĝo de prelegantoj inter ambaŭ grupoj.

5. Tiu ĉi kontrakto povas esti konkretigita aŭ ampleksigita laŭ reciproka interkonsento. Ĝi estas kompilita en kvar ekzempleroj, du en E-o kaj po unu en bulgara kaj germana lingvoj. La ĉefaj tekstoj estas tiuj en E-o. La nacilingvaj tekstoj estas samrajtaj kaj samsencaj tradukaĵoj.

6. Tiu kontrakto estas subskribita por du jaroj kaj validas ekde la komenco de 1979 — la jaro de la 30a datreveno de la fondiĝo de GDR.

*Magdeburg, en septembro 1978*

En la nomo de E-Societo

«Vekiĝo», Sumen

Prezidanto: Cvjatko Todorov

En la nomo de Kulturligo

de GDR — Urba Estraro Magdeburg,

E-grupo «Progreso»

Prezidanto: D. Dungert



Ekzistas ĝenerala opinio, ke la turismo estas unu el la plej gravaj kampoj de la publika laboro por E-o, kie oni tre bonrezulte povas apliki la Internacian Lingvon. Tial jam delonge TEJO — la junulara sekcio de UEA — laboras sur tiu ĉi kampo i. a. per sia Pasporta Servo. Tiu servo prizorgas senpagan gastigadon por junaj e-istoj fare de eksterlandaj geamikoj en ties propraj loĝejoj.

Tiun ĉi bonegan ideon, komence sub la nomo «gastigfamilioj», donis en 1966 d-ro Ruben Feldman—Gonzalez, prezidanto de la Argentina Esperantista Junulara Organizaĵo. La sekvan jaron helpe de siaj junaj argentinaj anoj kaj brazilaj kunlaborantoj li eldonis sesfolian informbroŝuron. En 1968 TEJO oficialigis la iniciaton sub la nomo «Programo Pasporto» kaj okazis la unuaj utiligoj. La ideo de d-ro Feldman—Gonzalez antaŭvidis, ke la gastiganto certigu al gasto senpagan tranokton, ĉiujn manĝojn kaj ĝenerale necesajn elspezojn, kio estis alloga oferto por ĉiu juna gast(in)o. Tio ĉi tamen evidentiĝis malfavora por la gastiganto, ĉar la kostoj por relative longa restado estis vere altaj. Pro tio la sukceso de Programo Pasporto estis tre modesta: oni dissendis du eldonojn de pasporta broŝuro po mil ekzempleroj. Laŭ la tria jarraporto de la 31 de decembro 1970 Programo Pasporto havis 49 gastigofertojn el 17 landoj en tri kontinentoj.

Do necesis urĝa ŝanĝo, kiu pliaktualigu kaj vigligu la Pasportan Servon. La tiama okcidentgermana respondeculo Georg D.Vinkler ŝanĝis en 1971 la devigajn kondiĉojn. La antaŭa demando: «Kiu pretas senkompenso gastigi kaj manĝigi eksterlandajn

junajn e-istojn dum ia longa tempo?» estis ŝanĝita per «Ĉu ankaŭ vi pretas iel tranoktigi eksterlandan amik(in)on por almenaŭ du noktoj?» Estis precizigita ĉu temas pri oferto de nura tranoktado, tranoktado plus matenmanĝo, tranoktado plus ĉiuj manĝoj, maksimuma daŭro, maksimuma nombro de gastoj, ties preferata aĝo kaj sekso. Nenies adreson oni publikigis. Nur post la konsento de la gastiganto la gast(in)o ricevis lian adreson. Oni forsendis plurajn milojn da informiloj kaj gastigaligoj. La sukceso estis kuraĝiga. La gastiganta reto konsiderinde kreskis kaj fine de 1971 disponis pri pli ol 800 gastigofertoj el 44 landoj.

Nuntempe la Pasporta Servo havas 300 gastigantojn en 40 landoj (laŭ pasintjaraj donitaĵoj), kie oni povas senpage tranokti. Ties lokiĝo estas disa: dum estas dek gastigantoj en pluraj polaj urboj, aparte turisme allogaj landoj (ekz. Greklando, Italio, Hispanio, Portugalio, Bulgario) tute ne aŭ malmulte estas reprezentitaj en la listo de gastigantoj. Ĝi aperas ĉiujare en februaro kaj kostas 10 francajn frankojn aŭ 10 internaciajn respondkuponojn. En 1978 oni disdonis la adreslibreton de gastigantoj eksperimente al homoj el netranspagipovaj landoj kontraŭ promeso, ke ili pagos la prezon al la unua vizitota gastiganto en transpagipova lando. La dezirantoj fariĝi gastigantoj, senpage ricevas la liston de gastigantoj kaj fidel la rajton mem uzi la servon. La limdato de enskribiĝo estas la 1a de decembro ĉiujare. Aĉetu, enskribiĝu aŭ petu informojn ĉe la gvidanto de Pasporta Servo: Jeanne-Marie Cash, 9 rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts le Roi, Francio.

**Evgeni Georgiev**

## ***Al la 90-jarigo de la unua E-societo en Bulgario***

*Canko Murgin*

### **PRI LA POLITIKA ASPEKTO DE LA UNUAJ BULGARAJ ESPERANTISTOJ**

Ci tie ni traktos la temon nur rilate al la unua dinamika duopo esperantista — Miloslav Bogdanov (1868—1914) kaj Nikola Kovaĉev (1867—1924). Bogdanov fariĝis esperantisto jam en 1887, Kovaĉev komencis simpatii al E-o ekde la aŭtuno de 1888 kaj estis varbita por la Movado en 1893.

Bulgario liberiĝis el sub la otomana jugo rezulte de la Rusa-Turka Milito (1877/78). Tiam kune kun la fremdula jugo ĝi forĵetis ankaŭ la feŭdismon. Tre malfrue kaj tre malrapide nia lando ekmarŝis laŭ la vojo de kapitalismo. La bulgara laborista klaso estis juna kaj nemultnombra, ĝi ĵus

naskiĝis kaj ekkreskis nombre kaj organize.

En tiu frua epoko Bogdanov kaj Kovaĉev estis ne nur e-istoj. Ili tre aktivis sur la ĵurnalista kampo, vigle interesiĝis pri la vivo de la popolo kaj laŭ sia kompreno partoprenis en la batalo por plibonigo de la socia vivo. En 1892 Bogdanov eldonis broŝuron pri iu socia problemo. Ĝi estis longe ĉar pozitive recenzita en gazeto «Socialdemokrat», aperanta en urbo Sevlievo. En tiu broŝuro Bogdanov ne ekskludas la eblecon, ke en la estonto la homaro ekmarŝus sur la vojo al komunismo. Laŭ partia aparteno li estis radikalo. Bogdanov estas fondinto de

junulara sekcio ĉe la Radikala Partio. Ekde sia esperantistiĝo li fariĝis respublikano.

Kovaĉev ankaŭ estis radikalo kaj respublikano. Li havis tre klaran komprenon pri la interklasaj rilatoj en Bulgario en la fino de la deknaŭa jarcento. En sia artikolo de novembro 1895 Kovaĉev skribas: «Ke la situacio de nialandaj laboruloj de tago al tago fariĝas ankoraŭ pli malbona, ke la laboristo en nia lando suferas pro mankoj kaj malagrablaĵoj, ke lia laborforto estas ekspluatata de la mastroj — ĉio ĉi okazas ĉiutage antaŭ niaj propraj okuloj. Dum la kuranta jaro eĉ komencis ofte okazadi laboristaj strikoj, kvankam ili estas nebone organizitaj. Dum la kuranta monato ree okazis striko en Sofio. Per unu vorto la situacio de la laboristoj en nia lando estas tre malesperiga!»

Kovaĉev tamen ne finas nur per konstato. Li plue disvolvas siajn pensojn kulpigante la registaron, kiu neniel zorgas pri la popolo, sed nur pri la ekspluatistoj kaj burokratoj: «Niaj ĝisnunaj registaroj tro klopodis por pli bone rekompenci kaj sekurigi la situacion de la burokrataro, sed pri la bedaŭrinda laborista amaso oni eĉ ne deziradis pensi.»

Plue Kovaĉev komparante la laboriston kun maŝino evidentigas, ke la laboristo estas en malpli bona situacio ol ĝi: «Nunmomente la situacion de la laboristaro oni povus kompari kun maŝino: kiam tiu lasta difektiĝas, la mastro venigas specialiston

por ĝin ripari, tamen se laboristo malsaniĝas, li fariĝas kiel nebezonata ĉifono — oni lin maldungas kaj anstataŭigas per alia.»

En 1891 j. Kovaĉev defendas la socialismon kiel ideon kun granda signifo pri la estonteco: «Ĉe tiom malbona situacio, en kiu troviĝas la laboristoj de nia lando, kreiĝis favoraj kondiĉoj por fondo ankaŭ de socialisma partio<sup>1</sup>, kiu prenis sub sia protekto la laboristaron kaj zorgas pri la plibonigo de ĝia sorto. Rezulte de tio nun la socialismo faras gravajn saltojn antaŭen, kaj ne estas malproksima la epoko, kiam tiu ĉi juna miniatura partio fariĝos la plej forta kaj dinamika granda partio, kiu celas reorganizi la tutan ŝtatan ordon.

La postuloj de niaj socialistoj ŝajnas al ni utopiaj, sed se ni trafolumos la historion, ni konstatos, ke en sia komenciĝo ĉiuj plej grandaj faroj de la homaro aspektis ne-realigeblaj!»

Por la nuntempa esperantisto tiu prognozo de Kovaĉev pri la pligrandiĝanta rolo de la marksisma partio en nia lando estas tre interesa. Bedaŭrinde, ĝis la fino de sia vivo Kovaĉev restis nur radikalo, respublikano, panslavisto. Sed tion, kion li ne povis fari, faris lia filo Georgo, kiu aktive partoprenis la batalon kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo (dum certa tempo li kunlaboris al nia elstara e-isto antifaŝisto Asen Grigorov).

<sup>1</sup> La *Bulgara Socialdemokrata Partio* (nuna *Komunista Partio*), fondita en aŭgusto 1891

## INTERVJUO

### KUN PROF. PAUL ARISTE

Pri Ariste en Estonio cirkulas legendoj. Oni diras, ke ne estas lingvo en la mondo, en kiu li ne povus interkompreniĝi. Li, estro de la katedro pri ugra-finnaj lingvoj ĉe la Universitato en Tartu, unu el la plej malnovaj en Eŭropo, posedas dekduon da lingvoj de la nuntempo kaj de la antikva epoko, disvastigitaj aŭ ekstreme maloftaj. Okaze de iu kongreso li interparolis kun rumanaj sciencistoj. . . ciganligve.

En la mondo de la lingvosciencistoj Paul Ariste estas konata nelacigebla vojaĝanto kaj esploranto pri idiomoj de malgrandaj popoloj. La de li verkita gramatiko de la lingvo de vodi (malgranda popolo en la Nordo de USSR) antaŭ nelonge estis publikita en Usono, en la ŝtato Indiana. Samtempe Ariste estas eminenta interlingvisto, specialisto de tiu scioregion, kiu okupiĝas pri studado de la lingva estonto de la homaro. Antaŭ nelonga tempo, okaze de sia sepdeka naskiĝtago, la sciencisto estis distingita per la ordeno de popolamikeco.

Paul Ariste havis dekkvar jarojn, kiam preparis sian unuan sciencon verkon en Esperanto. Jardekojn poste li fariĝis membro de la internacia akademio de tiu lingvo.

Mi delonge kaj bone konas prof. Ariste, renkontas lin en E-forumoj kaj eĉ vizitas lin en Tartu.

Ĉi-foje ni renkontiĝis en studenta kafejo. Malalta mezepoka volbaĵo, la tri koloraj ĉapoj de la Tartu-aj studentoj, ĝentila „Tere“ (Bonan tagon!) . . . La konversacio, kiel ĉiam, okazis en E-o.

— Mi scias, profesoro, ke vi posedas ekde duona jarcento E-on. Ĉu estis juneca entuziasmo, kiu daŭris la tutan vivon, aŭ la konvinko, ke tiu lingvo posedas internacian gravecon kaj estonton?

internaciaj kongresoj neniam havis eblecon restadi en la kabinoj, en kiuj laboras la interpretistoj? Mi ofte estis tie. Tiuj homoj faras utilan, sed malfacilan kaj penigan laboron, por ke la sidantoj en la halo povu aŭdi per aŭskultiloj la referatojn en siaj gepatraj lingvoj.

— Kaj la unua, kaj la dua. Ĉu vi dum



La loĝantaro de la mondo interkompreniĝas per miloj da lingvoj. Sed eĉ la plej bonaj haloj, kiel ekzemple en la kongrespalaco en Moskvo, disponas pri ebleco de tradukado nur en dudek ĝis tridek lingvojn, kaj nur en la plej disvastigitajn. Kio do malhelpis pli grandan interkompreniĝon? Ĉu la tekniko? Ne. Pli vere estas — se oni tiel povus diri — la malfacilecoj de la homa naturo. Kiom da interpretistoj necesas por traduki samtempe en, ni diru, tridek lingvojn? Kiom vi opinias? Preskaŭ mil. Ili devas esti ŝanĝataj minimume duonhore, ĉar pli longe neniu eltenas.

La angla sciencisto Ĝon Bernal skribis, ke oni devas ellabori radikale pli bonan rimedon de interkompreniĝo, precipe en nia tempo, ĉar la mondo fariĝas efika scienca kaj ekonomia komplekso, en kiu la babilona lingvokaoso estas terura reto.

Tia rimedo de interkompreniĝo ekzistas. Ĝi estas la internacia lingvo Esperanto. En la E-kongresoj ne ekzistas interpretantoj. Iliaj delegitoj ĝuas tion, kion Antoan Sen Ekzjuperi signas per «pompo de homa interkompreniĝo». Nu, tion vi mem ja scias. . .

— *Tamen mi d ziras paroli kun vi pri miaj duboj. Kelkfoje oni diras: por kio oni bezonas int nriacian lingvon? Mi simple l rnos la tri aŭ kvar el la plej disvastigitaj lingvoj, kaj la lingvoproblemo por mi jam ne ekzistas. Ĉu estas tiel, profesoro, kaj kiom da lingvoj vi parolas?*

— Ni nombru. Miaj gepatroj, kompreneble, parolis kun mi estone. Ne malproksime de nia loĝloko loĝis rusoj kaj germanoj. Tie mi lernis iliajn lingvojn. Tiutempe ni translokiĝis en Talinon, kie mi amikiĝis kun svedaj laboristoj. Sed kia amikeco estis, se oni ne povas interkompreniĝi ĝuste? Do mi lernis la svedan lingvon. Sed por la korespondado kun amikoj el aliaj landoj ankaŭ tio estis tro malmulta. Do mi okupiĝis pri E-o.

Kompreneble, mi posedas la unuopajn lingvojn diferencgrage. Estone, finne kaj germane mi parolas, pensas kaj skribas; facile mi povas interkompreniĝi ciganlingve; mi ankaŭ parolas hungare kaj mordvine, sed ne flue. Angle, ruse kaj svede mi ĉefe legas. Krome kelkaj dekduoj da lingvoj troviĝas en mia memoro kaj mi aktivigas ilin laŭ mia bezono.

Kelkiuj «kolektas» lingvojn kaj deziras fariĝi poliglotoj. Sed mi scias propraspekte: por konservi lingvon en memoro necesas ĉiutaga laboro.

Modifante proverbon, mi deziras diri: «Ekzistas multe da lingvoj, sed la vivo estas mallonga». Por kompreni nur duonon de la homaro, oni devus posedi amason da lingvoj — ĉinan, anglan, hispanan, araban, hin-

dan, rusan, japanan, germanan, francan k. a.

— *Sed el tiu nombro oni do povus elekti unu kaj proklami ĝin mondlingvo. Tiam proponon mi oft aŭdis. Pl i ofte la angla lingvo estas menciata por tiu rolo de «moderna latino».*

— Tio ne estas ebla. Tiam la parolantoj de miloj da aliaj lingvoj prave eligus krion de indigno. V. I. Lenin plej profunde pravis skribinte, ke neniu nacio kaj neniu lingvo rajtas posedi privilegiojn.

Male, E-o estas neŭtrala lingvo, kiu ne kreas neegalrajtan situacion al iu ajn nacio. Ĝi vere estas lingvo de paco kaj amikeco. Ni rememoru, kiamaniere ĝia kreinto, d-ro Zamenhof, procedis. Li eliminis, ĉefe el la latina lingvo, internaciajn vortojn, kiuj jam pasis la fajroprovon de aliaj lingvoj, ligis ilin per simpla, logika gramatiko sen esceptoj kaj donis al tiu miksaĵo la muzikecon de la itala lingvo. E-o fariĝis esprimebla kaj simpla lingvo, kiun ĝenerale oni povas lerni dum duonjaro. Sed ĝi fariĝis samtempe egalvalora lingvo, en kiun majstroverkoj de la mondliteraturo — Dante, Sekspir, Tolstoj, Puŝkin — estis tradukitaj. En USSR verkoj de Ĉehov, Majakovskij, Esenin, Gajdar kaj Garsia Lorka estis eldonitaj en la lastaj jaroj. En E-o jam aperas pli ol cent revuoj, inter kiuj la sovetaj «Paco» kaj «Por la paco».

La prezidantaro de la Akademio de Sciencoj de USSR komisiis antaŭ nelonge al sia Instituto pri Lingvoscienco okupiĝi pri la problemoj de helplingvo por la internacia interkompreniĝo. Tiu instituto jam eldonis libron «Problemoj de la interlingvistiko», en kiu oni konkludas, ke E-o estas la sola artefarita lingvo, kiu taŭgas por internacia interkompreniĝo.

— *Ĉu artefarita?*

— E-o estas en pli alta grado «artefarita» ol la etnaj lingvoj, sed ĝi estas polurita en la proceso de interkompreniĝo fare de amasoj kaj de verkistoj, kiuj verkis en E-o kaj per ĝia helpo.

Lingvo komprenebla por ĉiuj homoj estas pramalnova revo de la homaro. Ĝian speguliĝon ni trovas en la Biblio, en la legendo pri la turokonstruado de Babilono. Ĉar la homoj provis konstrui turon, kiu atingu la ĉielon, dio ilin punis konfuzante iliajn lingvojn kaj per tio prenante de ili la kapablecon kompreni unu la alian. El tiu mirakla turo la homoj konstruis stalojn kaj ŝanĝis sin mem preskaŭ en bestojn. Do eĉ en la biblia interpretado la multlingveco estis konsiderata «malbeno de la Ĉiopova».

Ni trovas la revon pri unueca lingvo en verkoj de Platon, Dekart, Lajbnic, Volter, Montesjkjo, Kampanela. Sed nur ĉirkaŭ la fino de la deknaŭa jarcento — dank' al

la scienca progreso kaj al la rimedoj de komunikado — la kondiĉoj maturiĝis por tia lingvo, kiu, ekzistante kune kun la naciaj lingvoj, kapablas fariĝi dua lingvo por ĉiu homo. Entuziasmoj pri E-o en nia tempo estis Lev Tolstoj, Maksim Gorkij, Anri Barbus, Romen Rolan, Lu Sin, Konstantin Ciolkovski, Vladimir Obruĉev ka.

— Al kiuj cirkonstancoj dankas E-o sian disvastiĝon inter la pacamikoj? Kaj fine, kiom da e-istoj ekzistas en la tuta mondo?

— Specialistoj ofte interkompreniĝas helpe de grafikaj priskriboj kaj formuloj; ili pli ofte posedas fremdlingvojn. Sed pacbatalantoj plej ofte estas ordinaraj homoj. Eĉ okazas, ke en iuj landoj mankas monrimejoj por pagi interpretistojn por iliaj kongresoj. En tiaj okazoj E-o povas helpi.

Jam en la jaro 1953 estis fondita internacia organizaĵo Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Ĝia prezidanto estas la bulgara e-isto Nikola Aleksiev<sup>1</sup>, membro de la Mondpaca Konsilio.

En la jaro 1973 Nikola Aleksiev kaj la ĝenerala sekretario de la Mondpaca Konsilio Romeŝ Candra substrekis en Moskvo komunan deklaron pri kunlaboro de tiuj du organizaĵoj, kiu rekomendas utiligi «la internacian helplingvon E-o por la firmigo

de la internaciaj interrilatoj». Cetere, en la pasintaj jaroj delegitoj de la Komitato pri Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando (SSOD) partoprenis E-forumojn en Budapeŝto, Helsinki, Madrido, Hamburgo, Tokio, Ateno kaj Rejkjaviko.<sup>2</sup> Niaj e-istoj lernas la lingvon en sindikataj kluboj, kiuj estas kolektivaj membroj de SSOD. La agado de la tutmondaj e-istoj estas gvidata de la Universala E-Asocio (UEA), kiu havas bonajn ligojn kun UNESKO.

UEA, fondita en la jaro 1908, nombras pli ol 30 000 membrojn en sesdek landoj. Sed tio nur estas la kerno. Unu el la E-lernolibroj en USSR estis vendita en eldonkvanto de 96 000 ekzempleroj. Same rapide estis venditaj la Esperanto-rusa kaj Rusa-Esperanta vortaroj de prof. E. Bokarjov en eldonkvanto de preskaŭ 100 000 ekzempleroj. Ni ne dubas pri tio, ke la Esperanta lernolibro de Magomet Isaev kaj Zinaida Semjonova, kiun eldonos libroeldonejo Nauka en 1978 j., havos saman sorton. Plue. En la jaro 1966 oni prezentis peticion al UNO enkonduki E-on en la lernejojn. Tiu peticio tiutempe enhavis jam sepdek du milionoj da subskriboj. Oni do aŭdace povas aserti, ke ekzistas milionoj da e-istoj en la tuta mondo. Por tia juna lingvo, kiel E-o, tio tute ne estas malgranda.

*El la rusa: M. Arnold*

<sup>1</sup> En la Oka Ĝenerala Konferenco de MEM en Varno (1978) estis elektita nova prezidanto de MEM, kaj Nikola Aleksiev pro liaj grandaj meritoj al MEM estis proklamita honora prezidanto de MEM.

<sup>2</sup> En la 63-a UK de Esperanto en Varno (1978) partoprenis ĉ. 140 sovetaj e-istoj — plej multnombre ol kiam ajn ĝis nun.

## Ni recenzas

### **KIA LINGVO ESTAS ESPERANTO?**

Tio estas la unua frazo de sorĉe interesa libro ĵus aperinta ĉe Universala E-Asocio sub la titolo «Lingvistikaj aspektoj de Esperanto». Sur 76 paĝoj la aŭtoro, John Wells (Ĝon Uels), respondas tiun demandon el strikte lingvosciencia vidpunkto. La leganto ne atendu trovi ĉi tie senpruvajn asertojn, ke E-o estas «facila», «logika» aŭ «fonetika». La aŭtoro — lekciisto en la fonetika fakoj de unu el la kolegioj de la universitato de Londono — rigardas la fonetikon, morfologion, sintakson, leksikon kaj semantikon de la Internacia Lingvo en la lumo de la moderna lingvistiko kaj en komparo kun granda nombro da naciaj lingvoj el diversaj familioj.

En tiu ĉi verko la leganto trovas respon-

dojn ekzemple al la demandoj: Kie situas E-o en la klasifiko de ĉiuj lingvoj? Kio ĝuste konsistigas «bonan» prononcon de E-o? Ĉu vere E-o estas lingvo aglutina? Ĉu la lingvo vere havas aŭ povas havi «liberan» vortordon? La amaso da ekzemploj, kiuj klarigas tiujn kaj aliajn demandojn, estas abunde dokumentitaj per fontocitoj kaj per ampleksa bibliografio. Krome, la lingvistike laika leganto trovas grandan helpon en indekso de terminoj, kiu por ĉiu faka termino indikas la paĝon, sur kiu ĝi unuafoje ricevas difinon aŭ klarigon.

La libro de d-ro Wells baziĝas sur serio de prelegoj prezentitaj en la kadro de Internacia Somera Universitato en la 61a UK de Esperanto en Ateno en 1976. Intertempe la materialo estis multe prilaborita, interkonsilite kun estraranoj de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, sub kies nomo ĝi estas nun eldonita.



Dank' al la bonaj ligoj kaj kunlaboro inter la Kooperativa E-Sekcio de BEA kaj la Centra Kooperativa Unuiĝo aperis en E-o la broŝuro «Konstruado kaj evoluado de la agrikulturaj labor kooperativoj en PR Bulgario» de prof. Ivan Lucov. Nur en 16 paĝoj la leganto trovas interesajn kaj sufiĉajn faktojn: historiajn — pri la apero de kooperativismo en la lando, organizaĵajn — koncerne la principojn de konstruado de la kooperativoj mem, ekonomiajn — organizo de la laboro, koncentriĝo kaj specialiĝo de la kamparana mastrumo sur industria bazo ka.

La broŝuro koncize, sed sufiĉe bone montras la pasintan vojon de la bulgaraj labor-

kooperativoj kiel specifa bulgara formo de organizo kaj produktado en la agrikulturo. Ĝi estas facile legebla kaj komprenebla ne nur de specialistoj, sed ankaŭ de pli vasta publiko. En ĝi troviĝas peto, ke la legantoj sendu sian opinion kaj proponojn al la eldoninto — la Centra Kooperativa Unuiĝo. Tio estas tre grava — ĝi donas informojn pri la intereso al la broŝuro kaj preparas favorajn kondiĉojn por novaj eldonaĵoj.

La broŝuron oni povas ricevi senpage de Bulgara Esperantista Asocio, p. k. 66, Sofio—Bulgario.

D. Mutuŝev

## Lingvaj demandoj

**Demando:** Ĉu post la pronomo „vi“, uzita kiel ĝentila adresvorto, oni devas meti la djektivon en pluralon?

**Respondo:** En E-o la pronomo „vi“ estas uzata:

1. Ĉe la dua persono de pluralo, ekzemple:

Kamaradoj, ĉar vi estas riĉaj, mi demandas vin, ĉu vi estas ankaŭ feliĉaj?

2. En ĝentila formo, anstataŭ „ci“ ĉe la dua persono en singularo, ekzemple: Kamarado, ĉar vi estas riĉa, mi demandas vin, ĉu vi estas ankaŭ feliĉa?

Fl. N.

En la rubrikon „Lingvaj demandoj“ la redakcio decidis enkonduki specialan fakon, dediĉitan al tradukoj de bulgaraj tekstoj en E-on.

Ni volonte akceptos ĉiujn kontribuaĵojn kaj mencios la nomojn de tiuj samideanoj, kies tradukoj estos plej trafaj kaj seneraraj. Kompreneble, ni ĉiam donos ankaŭ la modelan tradukon.

Bonvolu aktive partopreni en tiu ĉi utila por ĉiuj iniciato!

Kiel komencon ni proponas al la legantoj jenajn frazojn:

1. Много се интересувам от есперанто. Заинтересувах и приятелите си.

2. Девизът на седмата петилетка е: качество и ефективност.

## Verdaj steloj

### PALACO DE LA AMIKECO KAJ LA INFANECO

Jam 28 jarojn la infanoj de Sofio estas mastroj de tiu ĉi konstruaĵo — la Palaco de la Junpioniroj. Situinta meze de bonodora pinarbaro, proksime al bruaj stratoj, sed aspektanta izolita de la granda urbo per verda kurteno, la palaco akceptas en siaj salonegoj kaj ekipitaj kabinetoj centojn da gajaj geknaboj, ridetantaj kaj energiaj.

Ni povas renkonti ilin en ĉiu horo de la tago kaj kontempli iliajn ludojn, aŭskulti iliajn kantojn kaj admiri iliajn folklorajn dancojn kaj artaĵojn, elirintajn el sub la manoj

de malgrandaj artistoj. La specialiĝitaj grupoj kaj la diversaj studrondoj estas pli ol 80. En ili la infanoj fordonas sin senpage al siaj ŝatataj okupoj, sub la gvido de edukistoj kaj kvalifikitaj instruistoj. Ĉiu povas elekti okupon, kiun li preferas, kaj enskribiĝi en popoldanca kaj baleta ensemblo, en junpionira aŭ pupa teatro, en studrondoj pri pentrado, grafikarto kaj skulpturo, en kursoj pri muziko kaj ĥorkantado. Paralele kun la belartaj okupoj ekzistas la agokampo de la junaj teknikistoj kaj la mondo de la aŭtomatiko kaj radio-

tekniko, de la elektroniko, de la aviado kaj aŭtomobila tekniko. Tio ĉi estas vera palaco de la beleco, de la scio kaj la lerteco.

... Delonge mi ne vidis ion tiel fest-aspektan. Brilajn kolorojn de dekoj da mirindaj pupoj en folkloraj kostumoj el ĉiuj anguloj de Bulgario kaj infanajn vizaĝojn, lumigitajn de rideto.

— En la komenco mi volis fari nur pupojn, ili estas tre belaj, ĉu ne? Kaj poste mi ekinteresiĝis pri la etnografio, — konfidas al mi Borjana Gavrilova, lernantino, membro de la etnografia studrondo. — „Etnos“ — tio ĉi signifas „popolon“, kaj estas tre interese scii ion pri nia popolo, pri la vivo de la iamaj bulgaroj, pri iliaj festoj kaj naciaj kutimoj.

— Ni studas multe da objektoj, niaj kursoj estas interesoplenaj, — aldonas ŝia amikino el la sama studrondo, Despina Popova. — Dum la somero ni entreprenos sciencesploran ekspedicion en iu distrikto de la lando, tie ni vizitos la muzeojn, restados en la vilaĝoj, diskutos kun pli aĝaj homoj, vidos la naciajn kostumojn de tiu ĉi regiono. Fari belan pupon estas interese, sed ankaŭ malfacile. En la komenco oni devas fari krokizon. . .

Tiuj ĉi pupoj en bulgaraj kostumoj, faritaj de la delikataj fingretoj de la infanoj, estas perfektaj. Pli ol unu fojon ili parolas pri siaj kreintoj, tre multe pri Bulgario. En Britlando, en Belgio, en Finnlando, en Ĉeĥoslovakio, en Hindio kaj Japanio tiuj ĉi pupoj kaŭzis admiron pri la gusto kaj la lerteco de la junaj kreintoj de tiuj ĉi senditoj de la amikeco inter la infanoj.

En alia ĉambrego ni malkovras la morgaŭajn naŭtikajn konstruktorojn. Tie ĉi la plimulto estas knaboj. La modeloj de velŝipoj kaj motornavigiloj, kiujn ili konstruas, alportis ormedalojn de internaciaj konkuroj en Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR.

La samon ni povas diri pri la infankoruso „Bodra Smjana“, konata en la tuta mondo, pri la virtuozececo de la junaj muzikistoj de filharmonio „Pioniro“, pri la talento de la estontaj aktoroj el la junpionira teatro, pri la temperamento de la dancistoj el la folkloro ensemblo „Rosna Kitka“.

La Palaco de la Junpioniroj en Sofio, domo de la amikeco kaj infaneco, estas ĉiam malfermita por ĉiuj geknaboj, por ĉiuj infanoj, kiuj serĉas la vojon al la kono kaj la arto.


*Ilija Radev*

*Esperantigis: V. Borovanski*

<sup>1</sup> 120 infanoj de la 1-a ĝis la 7-a klaso okupiĝas pri ŝipmodelismo sub la gvido de la merita majstro de la sporto Panajot Kolev.

<sup>2</sup> En la studrondo pri etnografio, diference de tiu ĉi pri ŝipmodelismo, la knabinoj estas la plimulto, sed multaj knaboj povas envii iliajn sukcesojn — efektive la knabinoj gajnis 53 ormedalojn (grandnombre en internaciaj konkursoj) por „ludo per pupo“.

*Edukitoj de la ŝipmodelisma rondeto elprovas propramane faritajn modelojn*



## NOVAJ PROVERBOJ POR ĜMEDITEMAJ CERBOJ

Ĉiu bravulo — laŭ sia regulo.

Al ĉiu bravulo — konforma postulo.

Eksvingo fortula, sed rezulto nula.

Mallerta pafo — certa maltrafo.

Batalo senprepara — malvenko amara.

Du leporojn pafi — neniun trafi.

Granda figuro — saĝo miniatura.

Parolo pia, sed aĝo fia.

Belsonias la sentenco, sed kondukt' ne

konsekvenkas.

Fanfaronis karmo pri ludo per harpo.

Konformu farojn al la deklaroj.

Ne promesu en ĉielo grupon, sed en manon donu vi parupon.

*Nikolao Fedotov*





Kantas la lernantoj de Sonja Tihova el Gabrovo (vidu paĝon 8). Foto: d-ro M. Mirčev

## ALVOKO

### al E-organizaĵoj kaj unuopaj e-istoj

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano nia nova E-societo en Oulu, en norda Finnlando, aranĝos ekspozicion de infanaj desegnaĵoj. La elmonro okazos komence de septembro. La ekspozicio havos duonoficialan karakteron, ĉar por la aranĝo ni ricevis monsubvencion de la ŝtate financata Provinca Komisiono por Arto. Krom tio la ekspozicio okazos lige kun la Tagoj de Oulu, ĉiujare festataj en nia urbo per diversaj oficialaj aranĝoj.

Kiel videblas, la eksteraj kondiĉoj por sukcesigi la ekspozicion estas tre bonaj. Endas nur, ke ni disponu pri sufiĉe multaj desegnaĵoj el plej diversaj landoj! Tiel ni povos bone propagandi la Internacian Lingvon pruvante ĝian utilecon kiel perilon de

Sekretario: **Osmo Buller**

internaciaj kontaktoj. Do, jen ni turnas nin al vi kaj petas pri via bonvola helpo!

Ni esperas havi desegnaĵojn, faritajn de infanoj ĝis inkluzive 14-jaraj.

La temoj estas: INTERNACIA AMIKECO, HEJMO, LERNEJO, INFANAJ LUDOJ.

Adreso: Esperanto-Societo, Valtatie 6—8 B, SF-90500, Oulu 50, Finnlando.

Limdato por alsendo de la desegnaĵoj 30a de junio.

Al ĉiu partoprenanto ni sendos finnan memoraĵeton. Krome, la plej bonajn ni premie rekompencos.

Atendante baldaŭ multajn desegnaĵojn (kun la nomoj, aĝoj kaj adresoj) de vialandaj infanoj, ni samideane salutas vin!

Prezidanto: **Allan Mehtonen**

## GRAVA ANONCO

E-istoj, kiuj ekde la 1-a de julio vizitos la hungaran ĉefurbon, povos trovi noktolokon kaj restadon en nia somerdometo apud Budapeŝto, en parto de Buda-montaro, 10 minutojn for de la centro per aŭtobuso. Bona aero, belega regiono. Nur por esperantistoj!

Interesitoj, turnu vin al: Vilmos Radnay, H-2331, Dunaharaszti, P.O. Box 40, Hungario.

## deziras korespondi

### Bulgario

D-ro Georgi Nikolov Georgiev — ul. Rajna Knjaginja 17, 5500 Loveĉ (bk, monerojn, insignojn ka.)

Genka Dimitrova Koleva — blok 205, vĥod D, et. VII, ap. 13, 5500 Loveĉ (16-jara lernantino)

Hristo Iliev Hristov — 5553 selo Joglav, Loveŝko (lernanto)

Petro Angelov — ul. Ilinden 10, 5500 Loveĉ (33-jara — tutmonde)

Slavka Todorova — ul. Haĝi Dimitro 39, III et., 5800 Pleven (34-jara fraŭlino)

Stojan Georgiev — 5758 selo Slavŝtica, Loveŝko (26-jara fraŭlo)

Eliza Ljubenova — 3770 s. Arĉar, Vidinsko (23-jara flegistino)

Mariana Doĉeva — 5550 Dojrenci, ruskata gimnazija, Loveŝko (lernantino)

Atanaska Naĉeva Caĉeva — ul. Ĉerno More 11, 5500 Loveĉ (30-jara — tutmonde)

Ivanka Borisova — ul. Skobelevska 7, 5500 Loveĉ (21-jara fraŭlino, flegistino — tutmonde)

Todorka Dimitrova Genova — ul. Ivan Fotev 11, 5500 Loveĉ

Stefan Borisov Stefanov — 1759 Podgumer, Sofijsko

Stojĉo Georgiev — ul. A. Kânĉev 15, 5370 Drjanovo (19-jara — kun ĉl)

Marin Vasilev — 5189 s. Kucina, Velikotârnovsko (19-jara — kun ĉl)

D-ro Nikola Donev — str. Anri Barbjus 22, bloko 131, Sofio (64-jara — kun ĉl)

Ljudmila Dimitrova — ul. Kilika 4, 5940 Nikopol (22-jara fraŭlino)

Tanja Krâsteva Georgieva — 5282 s. Carevec, Velikotârnovsko (14-jara)

Petrana Todorova Ivanova — 5282 s. Carevec, Velikotârnovsko (26-jara)

(Sur p. IV)

*Teksto: G. Rudari*

*E<sup>b</sup>*  
Se mi po-vus ha-vi-gi al mi bu-ti-ke-ton kun du bre-

*B<sup>b</sup>*  
te-toj, ki-on ven-dus mi, ĉu sci-as vi? Es-pe-ron, es-pe-ron por

*E<sup>b</sup>*  
ĉi-uj. la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la,

*B<sup>b</sup>*  
la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la,

*E<sup>b</sup>* *A<sup>b</sup>* *Cm* *B<sup>m</sup>* *E<sup>b</sup>* *A<sup>b</sup>* *Cm*  
la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la, la,

*B<sup>m</sup>* *F* *B<sup>b</sup>* *Fm* *Cm* *G* *F<sup>#</sup>*  
A-ĉe-tu-ra-ba-te por vi! Ĉi-u de-vas es-pe-ron ja

*B<sup>b</sup>* *E<sup>b</sup>*  
ha-vi. Al ĉi-u nun do-nos mi tri-ob-le por lin

*B<sup>b</sup>*  
ra-vi. J-mo-non ne ha-vas kaj nur ri-gar-das min el eks-

*E<sup>b</sup>* *B<sup>b</sup>*  
te-re. su sen-pa-ge mi do-nus al li mi-an tut-ko-ran es-

*E<sup>b</sup>* *B<sup>b</sup>* *E<sup>b</sup>*  
pe-ron. la, la, la, la, la, la, la, la,

la, la, la, la, la, la.

multjara popola inutruistino, sociaganto,  
multjara membro de la estraro de E-societo  
«Vekiĝo» kaj E-lektoro.

